# La Riverego

Decembro 2002 | Esperanto-Societo Kebekia | Nro 70, Jaro 16a


# SKRIBU AL AVO FROSTO, LI RESPONDOS... ANKAŬ EN ESPERANTO!

Kristnasko 2002 alvenas kaj kiel ĉiujare, miloj da infanoj el Kanado kaj la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Tradicie en Kanado infanoj kiuj skribas al li en la franca, angla aŭ en dudeko da aliaj lingvoj ricevas respondon el la Norda Poluso. Nove ĉijare la geinfanoj kiuj skribos al Avo Frosto povos ankaŭ ricevi respondon en Esperanto.

En 2001, la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) traktis kun la Kanada Poŝta Servo sugestante la uzon de Esperanto por komuniki kun la esperantlingvaj infanoj de la mondo. La Kanada Poŝta Servo jesis al la propono de ESK kaj ekde Kristnasko 2002, Esperanto estos inter la korespondaj lingvoj uzataj de Avo Frosto kaj siaj helpantoj, la volontuloj de la Kanada Poŝta Servo por subteni alfabetigon.

La Esperanto-Societo Kebekia invitas ĉiujn esperantistojn, junaj kaj junkoraj, malkovri tiun kristnaskan tradicion skribi al Avo Frosto. Simple sendu manskribitan leteron al la sekva adreso:

AVO FROSTO
NORD-POLUSO
HOH OHO
KANADO - CANADA

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj kiuj lernas skribi. Ne forgesu klare skribi vian nomon kaj adreson por certigi ricevon de respondo.

Ni ankaŭ invitas la Esperantistojn kaj la esperantistajn organizojn tra la mondo varbi pri tio tiel ke la esperantlingvaj infanoj povos skribi al Avo Frosto ĉijare. Por ricevi pliajn informojn, kontaktu nin je avofrosto@yahoo.ca

Se vi planas publikigi artikolojn pri tio kun kristnaskaj ilustraĵoj, vi trovos taŭgajn bildojn ĉe la sekva retejo: membres.lycos.fr/avofrosto

Ni dankas antaŭe se vi povus sendi al ni ekzempleron de revuo, kie la informo aperis.

*Normand Fleury*
*Prezidanto*

P.S. Estas la unua Kristnasko kiam Avo Frosto uzos Esperanton kaj ĉar li laboras multe dum tiu jarperiodo, povas esti ke li iom eraros en la liverado de siaj korespondaĵoj. Ekzemple, li povus erari lingvojn au perdi leterojn. Se bedaŭrinde tio okazus al vi, ne estu tro malgaja rilate lin. Anstataŭ sendu retmesaĝon al avofrosto@yahoo.ca kaj la Esperanto-Societo Kebekia transdonos viajn komentojn al la Kanada Poŝta Servo. Ni bonvenigas ankaŭ aliajn komentojn. Feliĉan Kristnaskon! Ho! Ho! Ho!

# On vous attend pour les 20 ans !

**Depuis 1982, la Société québécoise d'espéranto fait la promotion des avantages de l'espéranto comme langue de communication neutre et efficace. Où en sommes-nous après 20 ans ?**

Nous vous invitons à prendre part à la fin de semaine qui clôturera le 20e anniversaire de la SQE. En voici le programme:

**Vendredi le 13 décembre**

-En soirée : Accueil et hébergement dans des familles espérantophones

**Samedi le 14 décembre**

10h : Maison de l'espéranto, 6358 rue de Bordeaux, Montréal - Métro Beaubien

-Discussion sur l'avenir de l'espéranto au Québec !

12 h : Dîner au quartier chinois et visite du Centre d'histoire de Montréal

18h: Grande fête avec souper communautaire au Jardin botanique de Montréal. ( 4101 rue Sherbrooke Est, Métro Pie IX, Complexe d'accueil des serres.)

Stationnement gratuit

-Retrouvailles avec les anciens

-Historique de la SQE

-Musique folklorique

-Prix de présence

**Dimanche le 15 décembre**

11 h : Brunch au Commensal, 1720 rue Saint-Denis, Métro Berri-UQAM

Visite d'un musée au choix...

# Nous parlons aussi français !

Comme nous vous l'avons annoncé dans les précédents numéros de La Riverego, la Société québécoise d'espéranto fête ses 20 ans cette année. Nous avons organisé depuis juin dernier, 20 activités (à Montréal, Québec, Trois-Rivières et au Vermont) pour souligner l'événement. La grande finale aura lieu la fin de semaine du 13 au 15 décembre à Montréal. Si vous ne pouvez être présent pour toute la fin de semaine, nous vous invitons à prendre part à la grande soirée du 20e au Jardin botanique de Montréal, le samedi 14 décembre à 18 heures. Les sympathisants et les amis de l'espéranto qui ne parlent pas ou peu l'espéranto sont aussi cordialement invités Au programme : Grande fête avec souper communautaire, retrouvailles avec les anciens, rétrospective des 20 ans de la SQE, musique folklorique, prix de présence et bien plus. Nous aimerions vous y rencontrer et soyez sans crainte... nous parlons aussi français! *Normand Fleury, président*

# Ni atendas vin !

Ni jam informis vin ke la 14an de decembro okazos grandan feston por la 20 jariĝo de ESK. Ni kore invitas vin partopreni la komunan vespermanĝon kaj festadon ĉe la Botanika Ĝardeno. Ni baldaŭŭ telefonos al la malnovaj membroj de ESK ĉar ni celas kunigi kiel eble plej multaj esperantistoj por tiu evento. Vidu la kalendaron por pliaj detaloj.

Estimataj geamikoj,

Ni kore invitas vin festi kun ni la 20an jariĝon de la Esperanto-Societo Kebekia kaj la 100an jariĝon de la Esperanto-movado en Montrealo.
Ni planis tutan semajnfinon da festado de la 13a ĝis la 15a de decembro en Montrealo.

Jen la programo:

**Vendrede vespere:**

Alveno ĉe la Montreala Esperanto-Domo (MEDO), 6358, rue de Bordeaux,
Metroo Beaubien (buso Beaubien) aŭ Fabre (buso Papineau).
Amika babilado kaj poste tranoktado laŭ Pasporta Servo.
(Se vi bezonos tranoktejon, frue anoncu vin je 514 272-0151 aŭ esperanto@sympatico.ca )

**Sabate:**

10h - Granda libro-bazaro ĉe MEDO

12h Tagmanĝo en la ĉina kvartalo.

PTM: Vizito al Historia Muzeo de Montrealo.
18h - GRANDA FESTO ĉe la BOTANIKA ĜARDENO, 4101, rue Sherbrooke Est, Metroo Pie IX
Komuna manĝo (kunportu pladon por dividi) ni provizos la manĝilojn kaj trinkaĵojn.
Tradicia muziko, prezento de la historio de ESK, premioj, ktp
22h - Bierumado ie...

**Dimanĉe:**

10h - Bruĉo ĉe Commensal, 1720, rue Saint-Denis

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto six fois par année. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Autrement, l'abonnement annuel est de 10$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia sesfoje dum la jaro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-doko de la Societo: kebk-d.

**Échéance pour le prochain numéro/Limdato por la venonta eldono: 2003.01.15**

jessylapointe@hotmail.com

Rédacteur en chef/Ĉefredaktoris Jessy LaPointe. Ont collaboré à ce numéro/Kunlaboris al tiu ĉi numero Normand Fleury kaj François Bay. Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK: Normand Fleury (président/prezidanto), Jérôme-Frédéric Bouchard (vice-président/vicprezidanto), Sylvain Auclair (trésorier), Jessy LaPointe (secrétaire/sekretario) kaj François Bay.

**Esperanto-Societo Kebekia/Société québécoise d'espéranto**
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal (Québec)
H2G2R8
Telefonrespondilo kaj telekopiilo/Répondeur et télécopieur: (514) 272-0151
esperanto@sympatico.ca
http://www3.sympatico.ca/esperanto